

Hector Hodler:
Koncerne la konflikton paco-milito neŭtraleco ne eblas
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1987 marto 19 kaj 21

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND.

Ni konstatas dum la serio da prelegoj, kiujn ni prezentis al vi, kiom grava estas la temo "la pacproblemo" en la ĵurnalista verko de Hector Hodler. La fondinto de UEA estis konvinkita, ke la sorto de esperanto estas intime ligita al tiu de la paco. Jen kion li skribis pri tio en decembro 1917, sub la titolo "Internacia ordo kaj internacia lingvo":

A.- "Estas necese, ke la esperantistoj mem komprenu, ke la sorto de ilia lingvo estas intime ligata kun la triumfo de la movado por starigo de paca ordo internacia. Esperantisto, kiu deziras la konservon de l' interŝtata anarkio, estas nekonscie malamiko de esperanto, ĉar per sia sintenado li helpas al la preterdaŭro de stato, ĉe kiu nia lingvo neniam povos triumfi. Okazaj sukcesetoj,.. ne devas malatentigi tiun evidentajn, ke por nia movado ne ekzistas pli granda danĝero ol la milito. Nu, kiu diras militon, diras ankaŭ logike ĝian profundan kaŭzon, nome la internacian anarkion."

Cl.- Koncerne la konflikton milito-paco, Hector Hodler opiniis, ke UEA ne povas resti neŭtrala, aŭ simple pasiva. En la nuna stato de internacia anarkio, ĝi havas respondecon, ĝi povas ludi edukan rolon. Kaj samtempe UEA devas pretiĝi por povi plenumi fundamentan funkcion reprezentativan, kiu estas sufiĉe kompleksa: peradi inter la vasta publiko kaj la internaciaj mondorganizaĵoj. Tiun ĉi ideon Hector Hodler ne akiris dum la milito, li havis ĝin jam antaŭe kaj estas ĝi, kiu fakte instigis lin dediĉi sian tutan tempon al la kreo kaj fortikigo de UEA.

A.- En sia parolado ĉe malferma kunsido de UEA en somero 1913, do unu jaron antaŭ la komenco de la unua mondmilito, Hector Hodler prononcis tiujn ĉi vortojn:

Cl.- "...La ondo de ŝovinismo, kiu trapasis Eŭropon, la atmosfero de malpaco kaj sango, en kiu ni vivadis, nedubable malhelpis la antaŭeniron de nia afero. Nuntempe, sub la influoj de aluditaj okazintaĵoj, ni devas konstati malprogreson de la internaciemaj ideoj, je kies irado - kian ajn opinion oni havas pri esperantismo - estas intime ligata nia movado. Kiam aŭdiĝas la bruoj de la armiloj, kiam ĉiu estas konvinkita, ke la sovaĝa batalo de la homo kontraŭ la homo devas anstataŭi la batalon de la homo kontraŭ la naturo kaj la mallumo, tiam ni ne esperu, ke multe progresos nia afero, kiu bazas sur intima trankvila kunlaborado de la homoj de ĉiuj gentoj kaj el ĉiuj nacioj. Teorie, oni ĉiam povas aserti, ke esperanto, estante nur lingvo, povas servi egale por la paco kiel por la milito; praktike, neniu senpartia homo povas nei la parencecon de la internaciemaj movadoj kun nia."

A.- En la sama parolado, Hector Hodler sin interese esprimis, koncerne al la originala eduka rolo, kiun UEA povas plenumi. Ni aŭdu liajn dirojn:

Cl.- "... La nombro de la servoj (de UEA) regule kreskas ne sole rilate al la nombro, sed ankaŭ rilate al propra graveco kaj seriozeco, En tio ĉi kuŝas la merito de UEA, ke tuj de la komenco ĝi proponis servojn al siaj membroj, ĝi favoris ilian reciprokan interkomunikiĝon, kaj povis -

post malmulte da tempo - prezenti palpeblajn rezultatojn. Ni insistas pri tio, ke UEA devas havi popularan karakteron. En la granda nombro de internaciaj organizaĵoj kaj institucioj, kiuj kreiĝis en la daŭro de la lastaj jaroj, tro multaj limigas sian agadon je pure sciencaj aŭ teoriaj laboroj, kiuj havas intereson nur por malmultaj homgrupoj. Estas la honoro de esperantismo, ke ĝi penas anstataŭi la pure teorian internaciismon per praktike travivata internaciismo, kiu, ne embarasante sin per formuloj aŭ doktrinfasadoj, rilatigas fremdulon kun fremdulo pri ĉiuj sferoj de la homa vivo, sur vere neŭtrala kampo. Per sia interŝanĝado de servoj ĉiujare pli multe uzata, UEA ne sole donas propran profiton al la uzantoj de tiuj servoj, sed ĝi praktike instruas al ili internacian spiriton, tio estas klarajn ideojn kaj ĝustajn konojn pri la vivo kaj mentaleco de la diversaj popoloj, sen kio ĉia alia jura alproksimiĝo estas neplenumbla en vere sincera maniero."

A.- Pri la originaia perada rolo, kiun UEA devus povi ludi, Hector Hodler donis interesan ekzemplon, en artikolo pri la "Poŝtaj demandoj", kiun li publikigis en februaro 1912. Post priskribo de la grava rolo, kiun plenumas la mondorganizaĵo Universala Poŝta Unio, Hector Hodler konstatas, ke ĝenerale la granda publiko povas interveni en la mondorganizaĵoj nur pere de siaj registaraj reprezentantoj. Kaj tiu limigita intervenkapablo malhelpas mondorganizaĵon kiel Universala Poŝta Unio evolui al "supernacia servaro". Hector Hodler opinias, ke UEA povus ludi originalan rolon kiel peranto inter la publiko kaj la mondorganizaĵoj registaraj. Ni tiurilate citu lin:

Cl.- "UEA, kiam ĝi estos pli forta kaj ampleksos pli grandan publikon de interesuloj kaj fakuloj, kiel firmoj, komercaj ĉambroj, internaciaj societoj, povos fari utilajn kolektivajn servojn, kunigante la pli-malpli izolajn plendojn kaj dezirojn de la publiko de 1' poŝtuzantoj kaj klopodante pri ilia kontentiĝo. Por tio la unua kondiĉo estas, ke niaj Delegitoj sin liberigu de la ideo, ke UEA estas pure esperantista organizaĵo."

A.- Pri tiu perada rolo, kiun UEA devus sin pretigi plenumi, Hector Hodler bedaŭrinde ne multon pli skribis. Nur aludoj tie kaj tie en liaj artikoloj kaj paroladoj montras, ke por li UEA vere plenumos sian internacian funkcion, kiam ĝi fariĝos pli *peresperanta* ol *poresperanta* instrumento. Tiurilate ni ankoraŭ citos eron el artikolo titolita "Post kvar jaroj", kiun Hector Hodler publikigis en marto 1912 :

Cl.- "Se ĝi volas antaŭenpaŝi kaj ludi seriozan rolon en la movado por la plifaciligo de la internaciaj rilatoj, estas necese, ke UEA estu ne nur pure esperantista organizaĵo, rezervata ekskluzive por la esperantista publiko. Ĝi devas pligrandigi sian agadkampon ankaŭ ekster la esperantaj rondoj. Daŭrigante, ec plimultigante, plibonigante la individuajn servojn, kiujn ĝi faras al siaj membroj, ĝi flanke de tio devos entrepreni kolektivajn servojn kaj klopodojn, kiuj estos profitigaj por la ĝenerala publiko de la interesuloj pri internaciaj aferoj."

A.- Kaj por doni konkretan ideon pri tiu projekto, Hector Hodler lanĉis la ideon de speco de internacia Turing-Klubo. La unua mondmilito kaj poste grava malsano kaj tro frua morto malhelpis lin doni al UEA la plurdimensionan agadkampon kaj funkciaron, kiuj "ŝovus" UEA-n, ni citas lin :

Cl.- "en la nombron de tiuj institucioj, kiuj estas nedetruiblaj, ĉar ili fariĝis vera publika bezono".

A.- La venontan semajnon ni konkludos tiun prelegserion, kiu provis rememorigi pri la penso de Hector Hodler, kiu naskiĝis en 1887, same kiel esperanto.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond diras al vi, ĝis reaŭdo !

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), decembro 2012*